n-ro 78

oktobro 2002

# La Merkato

ISSN 0941-9306

## Alvoko al niaj membroj

En pluraj, precipe afrikaj landoj, etaj komeristoj tre interesiĝas pri la agado de IKEF, sed tute ne, aŭ ne regule, kapablas pagi la kotizon. Tial la estraro de IKEF alvokas membrojn el pli bonfartaj landoj kontribui al fonduso, por pagi la kotizon de malpli bonfartaj gekolegoj. Alia ebleco estas 'patroni' membrecon, t.e. garantii regulan kotizpagon de iu membro.

## Retadresaro de IKEF-membroj

Nia ĉina peranto, s-ro Wang (komerco(a)public.xa.sn.cn), kolektas kaj regule dissendas liston de retadresoj de IKEF-anoj. Se vi havas retadreson, sed neniam ricevis tian liston, bonvolu komuniki vian retadreson al li. Se vi antaŭ kelkaj monatoj ricevis tian liston, bonvolu kontroli ĉu via retadreso en ĝi ankoraŭ estas korekta.

## Enhavo

Kongresaj raportoj .......... 3-5
Komercaj petoj kaj proponoj .......... 6-8
Novaĵoj ĉe Internacia Komerca Ĉambro .......... 10
Strategia Forumo .......... 11
La estonto de mono .......... 12

**La Merkato** (LM) (ĝis numero 26: *Laŭokaza Novaĵletero*) estas revuo de IKEF. Ĝi aperas kvaronjare (jan-apr-jul-okt) kaj servas al la membraro kiel komunikilo. Redaktoro: Roland Rotsaert. Limdato: mezo de la monato antaŭ apermonato.

**Estraro de IKEF**: S-ro Franz Josef Braun, Prezidanto kaj Ĝenerala Sekretario; S-ro Roland Rotsaert, Financa Konsilanto; S-ro François-Xavier Gilbert; S-ro Zoltan Könyves; D-ro Rainer Kurz; Prof. Ooba Atsua; S-ro Wang Tianyi

**Revizoro por la financa raporto**: D-ro Gianfranco Polerani.

**Centra sidejo**: Ĉe s-ro F.J. Braun, Hornisgrindestr. 8, D-77815 Bühl, Germanio.

**Financa sidejo kaj membrara administrado**:
Ĉe s-ro Roland Rotsaert, Visspaanstraat 97, B-8000 Brugge, Belgio,
telefono/fakso/respondilo: +32-50-330004; retpoŝto: rotsaert(a)esperanto.be.

La jara **membrokotizo** estas 15 eŭroj (EUR) por landoj laŭ UEA-kategorio "A" ("riĉaj landoj") kaj 10 EUR por landoj laŭ UEA-kategorio "B" ("malriĉaj landoj"). Tarifo por komuna membreco de IKEF kaj TAKE: 27 EUR (kat. A) aŭ 18 EUR (kat. B) jare. Egalvaloro en konverteblaj valutoj (ekz. usona dolaro - USD) kaj internaciaj respondkuponoj (IRK - kun stampilo de eldoninta poŝtoficejo) estas akceptata. Kurzoj estas proksimume 1 EUR = 1 USD = 1,20 IRK. Dumviva membreco akireblas per unufoja pago egalvalora al 20-obla membrokotizo. Por pago per kreditkarto kaj/aŭ aŭtomata jara pago sendu instrukcion al Flandra Esperanto-Ligo (FEL). Membroj kiuj aliĝas meze de la kalendara jaro pagu 1,5-oblan kotizon (t.e. por 18 monatoj).

**Kontoj**:

- ĉe UEA kaj FEL: kodo *ikef-c*
- belga poŝtĉekkonto: n-ro 000-1592629-83 (Swift: PCHQBEBB, IBAN: BE14 0001 5926 2983)

**Perantoj**

*Internacie*: Flandra Esperanto-Ligo (fakso +32-3-233.54.33, retpoŝto financoj(a)fel.esperanto.be)

*Ĉinio*: S-ro WANG Tianyi, Xi'an Jiangong-lu 3, CN-710043 Xi'an, telefono + fakso 0086-29-2232952, retpoŝto komerco(a)public.xa.sn.cn

*Francio*: S-ro François-Xavier GILBERT, 33, rue Louvière, F-55190 Void-Vacon (CCP 1275-89 L Nancy), telefono kaj fakso +33(0)3.29.89.82.15, retpoŝto efikso(a)aol.com

*Germanio*: S-ro Franz Josef BRAUN, Hornisgrindestr. 8, D-77815 Bühl (Volksbank Bühl, n-ro 713120, BLZ 66291400), telefono 07223/942064, fakso 942065, retpoŝto f.j.braun(a)t-online.de

*Hungario*: D-ro GETHER István, Berenyi u. 8, H-1016 BUDAPEST

*Italio:* D-ro Gianfranco POLERANI, Viale G. Suzzani 2, I-20162 Milano, retpoŝto g.polerani(a)tiscalinet.it (poŝta konto 37485208)

*Japanio*: S-ro YAMASAKI Seikô, J-185-0014 Tôkyô, Kokubunzi, Higasi Koigakubo 3-18-12, retpoŝto syama(a)dokkyo.ac.jp (pĝk. n-ro 00160-3-253232, kotizo 2000 enoj)

IKEF-informoj en Interreto: www.ikef.org aŭ http://users.pandora.be/ikef/



**Raporto pri IKEF-aranĝoj dum 87a Universala Kongreso en Fortaleza (Brazilo)**

(raportoj de F.J. Braun)

Informkunveno je lundo 5 aŭgusto 2002

La Estraro jam antaŭe decidintis, ke ĉi-jare en Fortaleza ne okazu Ĝenerala Kunveno de nia fakgrupo, ĉar la oficialaĵoj kiel akcepto de jarraportoj por 2001 kaj elektoj al la estraro estis faritaj perpoŝte. En la anstataŭa informkunveno prezidanto Franz Josef BRAUN kun ĉeesto de estrarano Profesoro OOBA Atsuo povis saluti 25 personojn, inter tiuj 13 membrojn. Aliĝis dum la kunveno du novaj membroj. Post voĉlego de skribaj salutmesaĝoj de kelkaj membroj (KÖNIG, Germanio, MBOGE-MBELE, Kamerunio, MEE, Britio, WANG, Ĉinio), Braun raportis pri la historio de IKEF ekde ĝia fondo en la jaro 1985, ĝiaj atingaĵoj kaj aktualaj agadoj laŭ statuto kaj laborplano. Ĉefa kaj ĝenerala celo de IKEF estas la akceptigo kaj disvastigo de Esperanto sur la kampoj komerco, ekonomio kaj ekonomiko per praktika uzo de la lingvo.

Multe diskutata estis la instigo kaj subteno de komerco per Esperanto inter esperantistaj komercistoj, nuntempe favore helpata de pluraj retpaĝaroj (ekzemple de IKEF mem - www.ikef.org - kaj de nia ĉina estrarano kaj peranto, s-ro WANG Tianyi - www.ko-merco.com) kaj la retlisto per-esperanto-komerco(a)yahoogroups.com. La partoprenan-toj samopiniis pri tio, ke aktuale Esperanto ne havas ŝancojn en la komerco de tutmon-digitaj grandentreprenoj, kie regas la angla lingvo. Tial oni koncentru sin al niĉoj ĉe mez- kaj malgrandaj entreprenoj kaj al mondopartoj kie la angla ne ludas tian rolon.

Ĝustatempe antaŭ la UK la Terminara Sekcio de IKEF sub la kunordigo de s-ro YAMASAKI Seiko eldonintis la Esperanto-version de „Uniform Customs and Practice for Documentary Credits" (broŝuro de ICC, International Chamber of Commerce, Parizo). Ĝi portas la nomon „Unuformaj Kutimoj kaj Praktiko de ICC por Dokumentaj Kreditoj" kaj estas grava helpo en internacia komerco. La estraro estis laŭdata en la kunveno pro tio, ke ĝi decidis senpage disdoni la broŝuron al „fidelaj" membroj (membroj pagintaj la kotizon dum kvin sinsekvaj jaroj). Braun atentigis al tio, ke ankaŭ nun aliaj membroj kaj novaj membroj povas ricevi senpage la broŝuron (kiu cetere kostas 9 EUR) per post- aŭ antaŭpago de 5-jara kotizo.

La Prezidanto ripetis sian alvokon el antaŭa La Merkato pri subteno de fonduso por interesataj membroj el nepagipovaj landoj. Tio povus plialtigi la nombron de la membraro kaj doni al esperantistoj el ekzemple Afriko la eblecon membriĝi en IKEF, dume aktuale ili ne povas pagi la kotizon de 10 EUR.

Vizito ĉe SEBRAE-CE je ĵaŭdo 8 aŭgusto 2002

14-kapa grupo de IKEF-membroj kaj interesatoj vizitis ĵaŭde SEBRAE en Fortaleza. Temas pri instituto por disvolvigo de la ekonomio en la ŝtato Ceará, de kiu Fortaleza estas ĉefurbo. Tiun viziton aranĝintis nia membro Gilbert LEDON, sed bedaŭrinde ĝuste la tagon antaŭ la vizito li lezis sian piedon, tiel ke li ne povis partopreni.

Post reciproka prezentado de la opaj personoj, fakestrino s-ino Marta Campelo akceptis nin, kaj kun kvar pliaj gekunlaborantoj prezentis al ni la taskojn de la diversaj subinstitutoj. La aktualaj eksportvaroj de la ŝtato Cereá estas antaŭ ĉio vestaĵoj, ŝuoj, tekstilo, fiŝoj, tropikaj fruktoj. Ĉefa celo: plialtigi la eksporton de la ŝtato Ceará; instigi, instrui kaj subteni la entreprenistojn al konsciiĝo pri ties neceso; enlanda industria prilaboro de la tropikaj fruktoj; plialtigi la produktokvanton per sistema irigacio (modelo Israelo). La montritaj ciferoj spegulis tre ambician planon. Prezidanto Braun deziris al la gastigantoj, ke tiuj planoj realiĝu favore al la ekonomia prospero de Ceará kaj Brazilo entute. Li transdonis al s-ino Campelo la laste faritajn terminarajn verkojn de IKEF, „Sindikata Terminaro", „Inkotermoj 2000" kaj „Dokumentaj Kreditoj". Post trihora prezentado, interrompita per koktelo de lokaj fruktoj, ni estis invitataj al komuna tagmanĝo en restoracio. Tie oni regalis nin per manĝaĵoj senescepte el la frukto akaĵuo (portugale: caju). La interpretadon portugala/Esperanto bonege faris nia brazila membro s-ro Silvio KNIESS MATES. Entute denove tre bona, valora kaj memorinda aranĝo de IKEF! Tio estis la opinio de ĉiuj partoprenintoj.


Supra foto ➜
Prezidanto Braun transdonas al s-ino Marta Campelo terminarajn verkaĵojn de IKEF. Maldekstre s-ro Silvio KNIESS MATES, kiu rolis kiel interpretisto.
Malsupra foto ➜
Vizitantoj de IKEF kaj gastigantoj de SEBRAE-CE en komuna foto-prezentado. Meze prezidanto F.J. Braun, dekstre apud li fakestrino s-ino Marta Camelo.

Kunsido de (parto de) Terminara Sekcio

Okazis dum la UK kunsido de s-roj YAMASAKI Seiko kaj Franz Josef BRAUN pri la estontaj agadoj de la Terminara Sekcio, kies kunordiganto estas s-ro Yamasaki. Oni aktuale estis en alte ĝoja animstato pro la sukcesa esperantigo „Dokumentaj Kreditoj". Ambaŭ akordis pri tripunkta programo de la estonta agado de la Terminara Sekcio:
1) helpi per traduko kaj reviziado al nia membro Daniel König, Germanio, en ties plano aldoni Esperanton al plurlingva retpaĝaro de sia komerca firmao „MobileDrive";
2) denove Esperantigi broŝuron el la programo de ICC, same kiel „Inkotermoj 2000" kaj „Dokumentaj Kreditoj"; s-ro Yamasaki elektos taŭgan projekton;
3) Esperantigi la ĉ. 5000 terminojn el la fakoj komerco kaj ekonomio de EURODI-

CAUTOM (datumbanko de Eŭropa Unio en Luksemburgo) kaj proponi al EU la transprenon de la Esperanto-terminoj al la datumbanko kiel plian lingvon.







**<u>Komercaj petoj kaj proponoj</u>**

<u>Komercaj petoj en Nederlando</u>

Vi jam povis legi en La Merkato, ke la komercpetoj aperintaj en LM nun ankaŭ aperas en speciala komercpeta bulteno de la nederlandaj Ĉambroj de Komerco (ĈdK). Jam dufoje oni publikigis IKEF-komercpetojn. Ĉar ĝi estas bulteno de alta reputacio oni aperigas nur seriozajn petojn. Tial la ĈdK petas kompletajn informojn de la petantoj. Ĉar diversaj IKEF-petoj ne plenumis tiujn kriteriojn, la ĈdK telefonis al mi, kiel akiri la necesajn datumojn. Mi promesis verki ĉi tiun artikoleton kaj poste mi tradukos kaj plusendos nur tiujn komercpetojn kiuj plenumas la petitajn kriteriojn almenaŭ grand-parte.

La ĈdK volonte ekscios la entreprenan profilon, kiu konsistu plej eble el:
1. kompanio nomo
2. nomo de respondeculo
3. kompleta adreso, telefono, telefakso, e-poŝto, interreto
4. karaktero (fabrikisto, eksportisto, agento, servada organizo...)
5. jaro de fondiĝo
6. nombro de personaro
7. linio(j) de produktoj
8. produktoj aŭ servoj petataj aŭ ofertitaj
9. uzataj lingvoj
10. kampoj de interesiĝo (importo, eksporto, agenteco, distribuanto, aĉeto/helpo de S+S, komuna firmao (joint-venture), fondiĝo de kompanio, alia)
11. specifikigo de via interesiĝo/deziroj por la eksterlanda merkato
12. mondoparto/lando de interesiĝo (se limigita) ekz. Eŭropo, Okcidenta Eŭropo, EU, Benelukso, Nederlando...

Per tiuj informoj la eventuala reagonto povas ricevi ideon pri la petanta firmao kaj ĝiaj deziroj, kio rezultos en serioza reago. Mi atentigas ke komercpetoj pri aro de disaj produktoj ĝenerale ne faras seriozan impreson.

Interesiĝantaj entreprenoj ankaŭ rajtas rekte sendi siajn komercpetojn kaj profilon al:
Ĉambro de Komerco, Dept. Internacia Komerco, Poŝtkesto 90154, NL-5000 LG TILBURG, Nederlando, fakse: +31-13-4686215 (oni ne parolas Esperanton!)

Per ĉi tiu iniciativo ni povas atingi, ke la ĈdK kaj la nacia industrio kaj komerco malkovras la (ankoraŭ modestan) rolon kiun la internacia lingvo povas ludi kaj la valoron de IKEF tiurilate.



Inĝ. Kees RUIG (Groesbeekseweg 53, NL-6581 BJ MALDEN, fakso +31-24-3580320)

IKEF senpage aperigas komercajn ofertojn, laŭ peto de membro aŭ de alia petanto. Tamen, ĝi ne kapablas kontroli la kvaliton de la ofertoj. Estas la respondeco de komercistoj laŭ kutimaj proceduroj esplori la fidindecon de la ebla nova partnero kaj/aŭ per specialaj teknikoj limigi la riskon.

**Angolo**

La kompanio 'ATJAL' (Exploracão Minera Limitada) bezonas alilandajn partenerojn kiuj deziras kunlabori pri la vendo kaj esplorado de petrolo kaj diamanto, konstruado, industria fiŝado, reprezentado, lignoj. Interesatoj kontaktu s-ron João Claudio T. Nsoko, c.p. 399, Luanda, Angola; fakso 00244.2.397033-397731, rete nsoko(a)hotmail.com.

**Ĉinio**

Mi nomiĝas Wen Gang. Mia E-nomo estas Venkon. Mi estas la ĝenelara sekretario de Nanchang-a E-asocio. Nanchang-urbo estas la ĉefurbo de Jiangxi-provinco kaj havas 2 milionojn da loĝantoj. Ĝi situas en la sudo de Ĉinio. En nia urbo troviĝas "Speciala Ekonomia Zono". La loka registaro starigis kaj proklamis la favorajn kondiĉojn por komercado kaj investado el eksterlandanoj al Nanchang. Por tio, mi establas E-kompanion. Mi esperas kunlabori en ĉiuj sferoj, precipe en turismo, importo, eksporto, ofertado, negoco, liverado, produktaĵo, konsumaĵo, malpezaj industrioj, tekstilaj industriaĵoj, artoj, edukoj, konstruoj, medicinaĵoj, hejmaj elektro-aparatoj, aŭtoj, ktp. Wen Gang, retadreso venkon(a)public.nc.jx.cn; poŝtadreso: Beijing Donglu 356 Hao, Sheng jijie shi gong Gongsi, Nanchang, Jiangxi CN-330029.

Por prosperigi la eksporton de diversaj hejmaj elektraj varoj, nia kompanio volas varbi kunlaborantojn tra la mondo. La kunlaboranto gajnas bonan salajron kaj premion, kaj laboras kiel sohisto (SOHO: Small Office and Home Office, t.e. ekde sia hejmo) kunlige per Interreto kun nia kompanio. Interesito kontaktu: S-ro YANG Chaoyin, TONGXIN COMMERCIAL CO., LTD, Rm.602, Ji-Unit, A-Building Kang Ning Yuan, No.262 Qingtan Road, CHANGZHOU CN-213015 Jiangsu;
tel/fakso: ++86-519-6974932, poŝtelefono: 0086-13961226855;
retadresoj: yardly(a)public.cz.js.cn kaj wtochina2001(a)yahoo.com.cn.

La verda teo Xinyang Maojian estas unu el la "dek famaj teoj de Ĉinio". Ni konstante serĉas partnerojn por ekspluati produktaĵojn el la teo; ni ankaŭ vendas la teon je la



prezoj de 5 USD/500g ĝis 25 USD/500g laŭ EXW Xinyang. Pli detaloj skribu al s-ro Zhang Xuesong, Changtaiguan Gongdiansuo, CN-464193 Xinyang, Henan, Ĉinio. Tel: +86-376-8821553, rete: kunlaboro(a)sina.com.

**Bulgario**

UPIEK demandas kontaktojn por brigadoj de konstrulaboristoj aŭ unuopuloj por riparado de domoj aŭ aliaj laboroj en Svislando, Germanio, Aŭstrio, Nederlando, Belgio, Francio. S-ro Lalo Stojkov NIKOV, p.k. 497, BG-1000 SOFIA, rete Lasto11(a)yahoo.co.uk

**Hungario**

Mi, kiel direktoro de la 1001 Ĝenerala Priserva Ltd., serĉas tiujn amikojn, kiuj dum la jaroj 1985-1995 ricevis de ni "1001" informilon hungarlingve kaj esperantlingve, por denove kontaktigi kaj helpi unu la alian. S-ro Jozefo Zonai, Nagy András u. 16., H-6500 BAJA, rete zonai_jozsef(a)primposta.com.

**Pollando**

Ni ofertas tekojn, ledotekojn, tekojn sur konferencejoj, plumujojn por gelernantoj, ingojn sur librojn kaj aliaj je la speciala mendo, ankaŭ kun surpreso kaj premo. Fotoj de niaj produktoj estas disponeblaj. Kontakto: Paŭlo Moszczynski, rete: imespaex(a)inetia.pl.

**Rusio**

Kiu bezonas helpon por fari komerckontaktojn en Rusio, bonvolu direkti sin al mi. La sfero de interesoj estas tre vasta, de lignoj kaj metaloj ĝis komputiloj. Mi nepre respondos al ĉiu. Aleksandr Mechev, str. Krasnnoyarskiy rabochiy, 113 - A, RU-660025 Krasnoyarsk, fakso +7 3912 553653, rete alex.mechev(a)land.ru.

**Eŭropaj kunvenoj kun IKEF-anoj dum julio-aŭgusto 2002**

Fine de julio en Leuven, Belgio, okazis OSIEK-konferenco, al kiu partoprenis IKEF-anoj Peeraerts, Rotsaert, Van den Bempt (la ĉefa loka organizanto de la konferen-

co), Witdoeckt kaj Yamasaki. Fine de aŭgusto en Verona, Italio, okazis la Eŭropa Esperanto-Kongreso, kun IKEF-anoj Behra, Bronzetti, Polerani, Kurz, Rotsaert, Spilsbury kaj Witdoeckt.

Ne okazis formalaj IKEF-kunvenoj, sed estis multaj neformalaj kontaktoj inter la membroj. rr

**Anoncitaj aranĝoj**

Ĉeĥio, Dobřichovice (apud Prago), 8-10 novembro 2002: Aplikoj de Esperanto en Scienco kaj Teĥniko (seckioj: elektronikaj rimedoj, terminologiaj problemoj, aplikoj en scienco kaj teĥniko). Informoj: KAVA-PECH, rete kaest(a)kava-pech.cz, www.ka-va-pech.cz.

Germanio, Borken (Okcidenta Vestfalio), 27.12.2002-3.1.2003, 19a Internacia Festivalo. Temo: Religioj kaj konfliktoj. Informoj: Hans Dieter PLATZ, Pf. 1148, D-34303 NIEDENSTEIN, rete hpd(a)internacia-festivalo.de, www.internacia-festivalo.de.

**Nia plej aĝa membro Franz Schneider mortinta**

Je 14 majo 2002 mortis nia membro Franz SCHNEIDER, em. bankdirektoro el Olpe, Germanio, en la alta aĝo de 96 jaroj. Kun membronumero 13 li estis dekomenca membro ekde la fondo de IKEF en la jaro 1985. Ni gardos honorigan memoron pri li.

F.J. Braun, prezidanto

**Forpasis Bruno Vogelmann**

La 8-an de julio 2002 forpasis Bruno VOGELMANN (1909-2002), esperantisto ekde 1926, honora membro de UEA, kunaŭtoro de 'Internacia Ekonomika Fakvortaro' kaj aŭtoro de 'La Nova Realismo' (tradukita el Esperanto al 25 naciaj lingvoj), laŭreato de premioj Deguĉi (1992) kaj FAME (1993).

(laŭ NUN, tra ret-info)]

**E-biografioj**

Kroataj esperantistoj jam prizorgis kolekton kun 1000 biografietoj de sialandaj movadanoj. Nun ili volas ripeti la projekton por la tutmonda esperantistaro. Ĉu vi estas aktiva esperantisto aŭ ĉu vi konas aliajn esperantistojn (ankaŭ mortintajn) kiuj nepre



estu en tiu kolekto? Petu teknikajn informojn de ivan.pleadin(a)kc.hinet.hr. (rr)

**Ĉina Radio Internacia**

Ĝis lasta tago de decembro 2002 Ĉina Radio Internacia (RI) organizas konkurson. Ĉiu partoprenanto almenaŭ ricevos memoraĵon. Por faciligi la korespondadon, RI nun havas perantajn adresojn en Argentino, Belgio, Germanio, Italio kaj Svislando. RI ankaŭ estas aŭskultebla interrete. Adreso: Esperanto-Sekcio, CRI-36, Ĉina Radio Internacia, pk 4216, CN-100040 Pekino; espradio(a)cri.com.cn, http://esperanto.cri.com.cn.

**Novaj (ret)adresoj**

18. Mboge (Kameruno) j_mboge(a)yahoo.com
54. Daniël KÖNIG (Germanio) daniel.koenig(a)coinvent.com
215. Frank A. SPILSBURY (Britio) fspils(a)bushinternet.com
246. Mulungula (Zambio) mulungulaj(a)yahoo.com
283. WANG Chengzhi, Huanshan-Lu 89 hao 5 - 1, CN-264001 Yantai, Shandong, Ĉinio, rete grenstar(a)public.ytptt.sd.cn
307. Santiago ALVAREZ (Kolombio) santibert(a)007mundo.com

**Novaj membroj**

321. S-ro Ole BLAUST, Kongensgade 18, DK-1557 Kobenhavn, Danio
322. S-ro Miguel Faria de BASTOS, Edificio América, Rua Soeiro Pereira Gomes, 7,9˚, 906, PT-1600-196 LISBOA, Portugalio, retadreso advokato(a)esoterica.pt

**Novaj eldonoj (anglalingvaj) de la Internacia Komerca Ĉambro**

**623: A to Z of International Trade (A-Z de Internacia Komerco)**

Ĝi estas pli ol komerca terminaro: 2000 difinoj, 9 artikoloj pri la ĉefaj temoj de la internacia komerco (aera transporto, asekuro, kreditleteroj, ...), 150 kapvortoj en franca-germana-hispana-angla lingvoj, detala bibliografio. (ISBN 92.542.1277.4, 334 p., 59 EUR)

**633: Documentary Credit Law Throughout the World (Leĝaro pri dokumentaj kreditoj en la mondo)**

Kvankam la Internacia Komerca Ĉambro difinis ĝeneralajn regulojn, finfine validas la

leĝoj de la unuopaj landoj. La aŭtoroj faris kompilon de la leĝoj pri dokumentaj kreditoj el pli ol 35 landoj. (ISBN 92.542.1298.7, 140 p., 50 EUR)

Mendoj ĉe http://www.iccbooks.com/ aŭ ĉe landa IKĈ-filio. rr

**Terminologia demando: franĉizo**

En Esperanto 'franĉizo' rilatas al asekura mondo: la parto de la damaĝo kiun la asekurkompanio ne kompensas. Tio korespondas kun la franca 'franchise'. Tamen, la sama vorto ankaŭ ekzistas en uson-angla lingvo. Tie rilatas al licenco por ekspluati iun komercon (rapidmanĝejon, hotelon, aŭtoluadon...) laŭ striktaj reguloj fiksitaj de la licencdonanto. Brazila komercisto Flavio Rebelo, lingva.sp(a)zipmail.com.br, demandas sin ĉu por tio ekzistas esperanta termino.

**Raporto pri la kunveno de la Strategia Forumo okazinta dum la 87-a Universala Kongreso en Fortalezo, Brazilo**

Estas oportune, eble, memorigi pri la celoj de la Stategia Forumo entute kaj pri ties ekesto-maniero.

La Strategia Forumo de la Komunumo naskiĝis okaze de la kongreso en Montpeliero, en 1988-a. Ĝi celis esti virtuala loko, en kiu ĉiuj organizaĵoj agantaj por/per Esperanto kontaktu unu la alian kaj restu en daŭra interkonsiliĝo tra la jaro rilate al la ĉefaj strategiaj agad-linioj. Ĉiu organizaĵo, kompreneble, restas tute sendependa, sed ĉiuj provas kunordiĝi kun ĉiu alia por la bono de Esperanto.

Laŭ tiu ideo la Forumo konsistu ĉefe el reprezentantoj de organizaĵoj, asocioj, ligoj, centroj, ktp. Tiu ideo validis en la unuaj kunvenoj, sed poste malrapide la kunlaboro tra la jaro iĝis malpli forta kaj la dumkongresaj kunvenoj iĝis pli influataj de la ĉeestanta publiko.

Ĉi-jare en Fortalezo ĉeestis trideko da homoj, el kiuj malpli ol 10 reprezentis organizaĵojn. Okazis tri ĉefaj prelegoj:

- Bessie Schadee, Indiĝenaj Dialogoj, parolis pri sia organizaĵo kaj ĝenerale pri la problemoj de neesperantista organizaĵo, kiu, tamen, uzas Esperanton kiel labor-lingvon kaj diversgrade kunlaboras kun la Esperanto-komunumo.

- Wera Dehler kaj Vincent Charlot parolis pri ATTAC kaj la agado de esperantistoj en la naciaj ATTAC-movadoj. La maniero laŭ kiu esperantistoj partoprenu tiun agadon



restas ankoraŭ decidota kaj same decidota estas la gvidado de tiu agado en Esperantujo.

- Wera Dehler prelegis, krome, pri la terminologia laboro en la Esperanto-movado. La manko de laborfortoj en tiu kampo estas vere lamentinda, kaj oni rekomendas al iuj fakaj organizaĵoj prizorgi sian kampon kaj raporti pri la rezultoj kaj problemoj per la listo terminologio-l(a)yahoogroups.com, kiu estas la nura loko en kiu terminologiistoj interŝanĝas siajn spertojn.

Oni decidis, ke UEA havas la taskon aranĝi la venontjaran kunvenon dum la UK en Gotenburgo kaj ke ĉiuj deziras reveni al la komenca formulo de kunlaborado tra la jaro inter reprezentantoj de organizaĵoj kaj parol-rajto en la venontjara kunveno nur al rajtigitaj reprezentantoj.

Renato Corsetti, reprezentanto de UEA en la Forumo

## Scienc-praktika seminario en Bulgario

La 2-a Internacia Scienc-Praktika Seminario okazis inter 02-05.07.2002 en Sofia, Bulgario. Temo de la aranĝo estis "Utiligo de Esperanto en Komerco, Turismo kaj Interhomaj Rilatoj". Okazis ekspozicio kun kontraktado de varoj de komercaj kaj industriaj firmaoj, reprezentitaj de partoprenantoj en la seminario kaj de lokaj firmaoj, de ekspozicio de turismaj prospektoj kaj de ekspozicio de kovertoj, poŝtmarkoj kaj poŝtkartoj el la tuta mondo, ricevitaj de loka esperantistino.

Krome okazis prelegoj pri "Komerco per Esperanto", "La rolo de Esperanto-turismo por la proksimiĝo de la popoloj", "Esperanto en la interhomaj rilatoj sur nacia kaj internacia tereno" kaj kunsidoj de la seminario en sekcioj "Esperanto-komerco", "Esperanto-turismo", "Esperanto kaj la interhomaj rilatoj", "Komerco per Esperanto en Balkanio, E~uropo kaj kun aziaj landoj", "Komunaj balkanaj kaj eŭropaj turismaj projektoj", "Esperanto en la formalaj kaj neformalaj interhomaj rilatoj".

Emiliya Peychinova (emapeychinova(a)hotmail.com, ret-info)

## La estonto de mono

Organizaĵo por Ekonomiaj Kunlaboro kaj Evoluigo (OEKE, www.oecd.org) je 11-13 julio 2001 en Luksemburgo organizis konferencon pri la estonto de mono. La angla versio de la kongrestekstoj (‘The future of money', .pdf-formato, 1,2 MB) estas senpage elŝutebla je la OEKE-libroservo:
http://oecdpublications.gfi-nb.com/cgi-bin/oecdbookshop.storefront (per la ŝercilo serĉu la titolon). Franclingva versio (‘L'avenir de l'argent') estas anoncata.

La tekstoj detale priskribas la multajn projektojn por krei ‘virtualan' monon, facile uzeblan en elektronika, perreta komerco. Jam multaj tiaj ideoj fiaskis, kelkaj restas kaj eble pluvivos. Plej sekvinda estas SELT (Singapore Electronic Legal Tender, singapora elektronika leĝa monsistemo), la plano de la singapora registaro por ene de dek jaroj komplete forigi monbiletojn kaj monerojn.

Tamen, estonte plej valora verŝajne restos la 2a ĉapitro de Michel Aglietta, Université de Paris X – Mini Forum and CEPII, pri la origino de nia nuna monsistemo. Kvankam la teksto estas iom malfacile legebla (certe en fremda lingvo kaj sur komputila ekrano), ĝi bone priskribas kiel dum 5 jarmiloj evoluis la mono kiel valormezurilo, pagilo kaj ŝparilo.

rr